

Baumwolle aus ökologischem Anbau und Gesundheitsrisiken *

S. M. Milnera

Zusammenfassung

Hoher Kostenanteil von Agrochemikalien verteuert einerseits den Baumwollanbau, andererseits verursacht der Chemikalieneinsatz in den Anbauändern eine enorme Umweltbelastung. Die Konsumenten sind über die möglichen Rückstände von Pestiziden in den Produkten aus Baumwolle beunruhigt und verlangen zunehmend Waren aus sog. „organischer“ Baumwolle. Dies hat positive, aber auch negative Auswirkungen.

Einleitung

In den vergangenen ca. 10 Jahren wurden die europäischen Konsumenten einer z.T. gezielt desinformierenden Pressekampagne ausgesetzt, aus der viele Leser den Eindruck gewonnen hatten, daß ihr Kleiderschrank einer chemischen Giftbombe ähnelt. Zur Irreführung des Konsumenten genügt es zum Beispiel, wenn man in einem Artikel angibt, wie viel Tonnen von Pestiziden weltweit jährlich beim Baumwollanbau verwendet werden und wenn man diese Mengen als "Baumwoll-Schadstoff-Frachten" bezeichnet, aber zugleich dem Leser verschweigt, dass Insektizide eingesetzt werden, noch bevor sich die Kapsel geöffnet hat und dass sie - wenn überhaupt - in die Faser nur in solchen Mengen gelangen können, die man als vernachlässigbar bezeichnen kann.

In der Untersuchungsreihe der Bremer Baumwollbörse ⁽¹⁾ lagen die Pestizidwerte in Rohbaumwolle unterhalb der für Nahrungsmittel geforderten Höchstwerte, wobei zu bedenken ist, dass Baumwolle natürlich nicht gegessen, sondern nach dem Verspinnen (ggf. nach dem Webvorgang) im Regelfall gewaschen, gebleicht, gefärbt oder anders nass veredelt (und dadurch von Pestizidrückständen befreit) wird, und danach ohnehin "nur" auf der Haut getragen wird. Auch beim alkalischen Abkochen ⁽⁴⁾ werden die Pestizide aus der Baumwolle ausgewaschen.

* Vážnému kolegovi, panu RNDr. J. Kavkovi, CSc., věnováno s přáním všeho nejlepšího k 80. narozeninám

Kotono el ekologia kultivado kaj riskoj por la saneco *

S. M. Milnera

Resumo

Alta kostoparto de agrokemiaĵoj unuflanke plimultekostigas la kotonokultivadon, aliflanke la uzado de ĥemiaĵoj kaŭzas grandegan naturmedian poluon en la kultivaj landoj. La konsumantoj estas maltrankvilaj pri la eblaj restaĵoj de pesticidoj en produktoj el kotono kaj kreske postulas varojn el la t.n. „organika“ kotono. Tio ĉi havas pozitivajn, sed ankaŭ negativajn konsekvencojn.

Enkonduko

Dum la pasintaj ĉ. 10 jaroj la eŭropaj konsumantoj estis elmetataj al parte intence misinforma gazetara kampanjo, el kiu multaj legintoj ricevis la impreson, ke ilia vestoŝranko similas al ĥemia venenbombo. Por trompi la konsumantojn sufiĉas ekzemple, ke oni indikas en artikolo, kiom da tunoj da pesticidoj estas uzataj tutmonde ĉiujare por kultivi kotonon kaj kiam oni nomas tiun kvanton „kotonpolua ŝarĝo“ kaj samtempe silentas pri tio, ke insekticidoj estas uzataj antaŭ ol la kapsulo malfermiĝas kaj ke ili - se entute - sukcesas eniĝi en la fibron nur tiakvante, ke ili estas ignoreblaj.

En la analizserio de la Bremena kotonborso ⁽¹⁾ la pesticidvaloroj en kruda kotono estis sub la maksimumoj permesitaj por nutraĵoj, kaj konsiderendas, ke la kotono kompreneble ne estas manĝata, sed post la ŝpinado - eventuale post la teksado - kutime estas lavita, blankigita, kolorigita aŭ alimaniere malseke plibonigita (kaj per tio liberigita de eventualaj pesticidrestaĵoj) kaj poste ĉiukaze portata „nur“ sur la haŭto. Ankaŭ dum la alkala dekoktado ⁽⁴⁾ la pesticidoj estas forlavitaj el la kotono.

* Dediĉita al estimata kolego d-ro Josef Kavka okaze de lia 80a naskiĝdatreveno kum elkoraj gratuloj